

Literatura Mondo, 7-a parto: Reformismo, stilo
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 633, 1975.11.26 & 29

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En la jaroj 1922-1926, kiuj respondas al la unua periodo de *Literatura Mondo*, la reforma tendenco ankoraŭ tre viglis. Ĝi plej akre esprimiĝis en la idista skismo, sed ankaŭ en plej diversaj lingvo-projektoj, kies publikigo revekis diskutojn kaj dubojn aŭ seniluziigojn.

A.- En majo 1925, en la rubriko **Leterkesto**, responde al ano de la **Lingva Komitato**, Kalomano Kalocsay, sub la pseŭdonomo **Kopar**, esprimis la vidpunkton de la gvidantoj de **Literatura Mondo**. Estas interese citi erojn el tiu ĉi grava teksto:

Cl.- « Vi rekte demandas nin, kion ni opinias pri la Nov-Esperanto de sinjoro de Saussure. Ne tre volonte ni respondas, ĉar tiu ĉi demando estas ekster la kadroj de nia agosfero. Ni uzas la lingvon, do problemo por ni povas esti nur ĝia uzebleco kaj ne ĝia teoria perfekteco en tiu aŭ alia rilato. Ni estas konvinkigitaj, ke tia perfekteco estas relativa kaj, ĝuste pro tio, ĝia serĉado kondukas nur al diskutoj kaj disputoj, sed neniam al definitiva, do **uzebla** lingvo. [...]

A.- Zamenhof multe batalis siatempe kontraŭ reformemuloj. Fine ili ekzigis, aniĝis al aliaj projektoj kaj – de tiu tempo vivas Esperanto. Kiom da kapoj, tiom da ĉapoj – jen la granda danĝero por artefarita lingvo. Kaj el ĉi tiu danĝero la sola eliro estas, se ni povas diri diktatore : « jen **la** internacia lingvo, ĝi ekzistas, ĝin parolas miloj kaj miloj da homoj, kiuj tute ne scivolas pri via persona gusto kaj prefero. Se ĝi ne plaĉas al vi, mi kompatas vin, ke vi devas uzi lingvon, kiu al vi ne plaĉas. Cetere – trankviliĝu, vi alkiutimiĝos. » Tiu parolo, nun, post la multaj sukcesoj de Esperanto, estas pli ebla kaj malpli ridiga, ol en la unuaj tempoj. Kaj kiam ĝi estos tute memkomprenebla – tiam venkos Esperanto. [...]

Cl.- Nia zorgo ne estas plu la strukturo de la lingvo, por ni ĝi estas definitiva, preta. Ni ja estus vere ridindaj, se ni volus evoluigi literaturon en lingvo, kiun oni morgaŭ eble ŝanĝos ĝis nereconebleco. La stilo, jen nia sola zorgo, ĝin ni volas evoluigi ĝis tia nuancriceco, ke ĝi neniom restu malsupera al la naciaj lingvoj.

A.- Dum ĉi tiu evoluo ja povas okazi malgrandaj ŝanĝetoj, sed ili venos iom post iom, kvazaŭ nerimarkeble, kaj propre eĉ ne estos ŝanĝoj, nur riĉiĝoj.

Cl.- La belsoneco de Esperanto estas por ni senduba, pro alkiutimiĝo ni sentas nin en la lingvo hejme kaj ĉiu nenatura ŝanĝo frapas nin malagrabla, kvazaŭ stranga, slanga malperfektaĵo.

A.- Ĉu la lingvo, aŭ iu ĝia vorto estas perfekta laŭ diversaj konsideroj (kiuj cetere tre ofte kontraŭdiras unu la alian) tio tute ne interesas nin. La kapricojn, malglataĵojn ni rigardas simple specialaĵoj, kiujn artisto povas uzi por siaj celoj. La francojn ne ĝenas, ke ili devas diri **mi ne manĝis paŝon** kaj **kvardudekdek** anstataŭ **mi ne manĝis** kaj **naŭdek**. Ankaŭ nin ne ĝenas strange faritaj vortoj, kapricaj reguloj, ni scias pri ili **teorie**, sed ni ne rimarkas ilin **praktike**, dum la uzo de la lingvo. Nur laŭ tia sento de la lingvo ni povas diri vere, ke Esperanto estas vivanta lingvo. Kaj ĉi tion ni diras kaj laŭ ĉi tio ni agas !

Cl.- Ni ne komorenas ekzemple la antipation de sinjoro Stojan kontraŭ la oficiala (kaj Zamenhofa !) vorto **abismo**. Ĝi estas Esperanta vorto – kaj finite ! Kiun interesas plu, ĉu ĝi estas pekteka laŭ internacia etimologio?

A.- Por fini – ni ĝojas pri ĉiuj apartaĵoj, ĉar ili estas esperantismoj, do pruvoj pri la memstara vivo de la lingvo. Kaj pri Nov-Esperanto ni certe scias, ke ĝi restos projekto. » Kopar.

Cl.- Jen citado el alia **Leterkesto** publikigita malantaŭ la kovrilpaĝo de **Literatura Mondo**, aprilo 1926. Temas pri respondo de **Jobo** al **H. S.** en **Berlino**, kiu montras, ke reformistaj aŭtoroj provis publikigi siajn verkaĵojn en *Literatura Mondo* :

A.- « Viaj manuskriptoj pruvas vian talenton por krei **kuriozan** stilon, sed bedaŭrinde la enhavo estas anemia. Ne la vivo, ne la intelekto pulsas en la fraz-vejnetoj – nur la laŭmoda moderneco. [...]

Cl.- Krome vi havas kulpon kontraŭ **nia lingvo**, kiun vi ne estimas tiagrade kiel vian nacian. Tro libere vi klarigas al vi la **elastecon** de Esperanto. Jes, ĝi havas elastecon, sed vi trouzante ĝin kripligas ĝian naturan belecon. Certe vi ne kuraĝus fari la samon en via nacia lingvo. La enkonduko de tiaj superflujaj gramatikaj formoj forrabus la simplecon, tujan kompreneblecon, ili konfuzus kelkajn kaj instigus je plua kripligo aliajn, kiuj celas fariĝi **mondfamaj stilistoj**.

A.- Viaj artefaritaj manuskriptoj aflikis nin, sed la akompana letero servis je nia konsolo : ĝi estas komprenebla, belstila kaj senerara, ĉar tie vi ne celis krei **majstraĵon**. Tamen via letero indas pli por la publiko ol la ŝvitodora stiltordaĵo de viaj manuskriptoj. En la simpleco estas la vera arto. [...] »

Cl.- En la sama **Leterkesto**, en teksto adresita al **Nordano** ni trovas alian aludon al la reformismo. Jen ĝi :

A.- « Verku la samon uzante la samajn vortojn sen kripligo de la gramatikaj formoj kaj ni publikigos ilin. Ni sincere bedaŭrus, se via talento fariĝus viktimo de ne racia reformemo. Konsideru nin viaj amikoj, kiuj estas adeptoj de natura evoluo, kaj por personaj gustoj ne riskas la unuecon. [...] »

Cl.- Dum la dua periodo de **Literatura Mondo** la reformismo iom post malakriĝis kun la disfalo de la idista skismo kaj la troa multiĝo de novaj lingvo-projektoj, kaj ĉefe ĉar Esperanto mem, stile kaj vortare, dank'al la influo de ĉiam pli lertaj verkistoj, pli kaj pli riĉigis.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!